

Miĥaelo Rikardo Balicki

La veneda — prezento de planlingvo

1. Enkonduko

En tiu ĉi laboraĵo mi esploras kaj priskribos la artan planlingvon fare de Jan van Steenberg, kiu nomiĝas *wenedyk* (/vɛ.'nɛ.dɪk/) aŭ *lēgwa wenedka* (/lɛŋ.gva vɛ.'nɛt.kə/, 'la veneda').

2. La fono

2.1. Alternativa historio de la mondo

La lingvo veneda estis kreita sub la influo de la lingvo *Brithenig* (/brɪ.θə.'nɪg/) aŭ *Comroig* (/kɒm.'rɔɪg/, 'la komra'), arta natureca planlingvo kreita en 1996 de novze-landano Andrew Smith (nask. 1965). La komra lingvo komenciĝis kiel penseksperi-mento pri la ebla evoluo de latinida lingvo (pluevoluo de la brita dialekto de la popola vulgara lingvo) en la Brita insularo, parenca al la franca, la hispana ktp.

Ekde 1997 ĝi naskis *the Brithenig Project* — la tutan projekton de alternativa historio de la mondo, kiu altiris al si plurajn ŝatantojn, emajn kreskigi kaj kompletigi ĝin per siaj aldonoj. Tiu ĉi alternativa mondo, aktive disvolvata de pluraj aŭtoroj, ekde 1999 funkcias sub la nomo *Ill Bethisad* (/ɪl̩ bə.θɪ.'səd/, 'la universo')¹.

2.2. La aŭtoro

La aŭtoro de la veneda lingvo estas Johannes (Jan) Hendrik van Steenberg (/**j**o:.'hɑ.nəs **j**an 'hɛn.drɪk van 'ste:n.bɛr.ɣən/, nask. 3.06.1970) — nederlandano, diplo-mito pri la polaj-ukrainaj interrilatoj ĉe la Universitato de Amsterdamo, ĵurnalisto, tradukisto pri la pola lingvo kaj planlingvisto. Ekkoninte la projekton *Ill Bethisad*, en 2002 li komencis prilabori sian propran aldonon al tiu ĉi alternativa mondo.

Krom la venedan kaj kelkajn malpli grandajn lingvoprojektojn, li kunkreis la internacian helplingvon *međžuslovjansky* (skribata ankaŭ kiel *међжусловјанскы*, 'la interslava'), kiu atingis sufiĉan gradon de rekonebleco.

¹ La komra vorto *bethisad* estas semantika kalko de la kimra (reala) *bydysawd* /bə.'dɑ.səʊd/ ('universo'), kiu fascine mem devenas de la latina *baptizatus* ('baptita').

2.3. La celo

Laŭ van Steenberg, la baza ideo de la veneda lingvo estis respondi la demandon „Kiel aspektus la pola, se ĝi estus latinida anstataŭ slava?”. Por efektiviĝi ĉi tiun celon la kreinto entreprenis al la latina apliki la samajn historiajn ŝanĝojn, kiuj gvidis la evoluon de la pola lingvo el la praslava (aŭ pli precize: al ties lasta etapo de evoluo, t.e. la frua komuna slava lingvo de ĉ. 500 p.K.). La fonetikaj ŝanĝoj estis plenumitaj laŭ kelkaj historiaj etapoj, por certigi la ĝustan ordon en ilia aplikado, laŭ la preciza skemo nomita *Grand Master Plan* (‘Granda ĉefplano’).

3. La priskribo

3.1. La deveno kaj la nomo

Enuniverse la nomo de la lingvo venas de la popolo, kiu ĝin uzas — *Wened*² (‘venedo’, mlt. *Wenedy* ‘venedoj’) — laŭ kiu nomiĝas ankaŭ ties lando *Weneda* (‘Venedujo’). *Rzeń Wenedór* (‘la Veneda Reĝlando’) kune kun *Rzej Litwanór* (lit. *Lietuvos Karalystė*, ‘la Litova Reĝlando’) formas unu unian regnon *Rzejpybiełka Dwar Korunar* (lit. *Dviejų Karūnų Respublika*, ‘Respubliko de la Du Kronoj’).

3.2. La fonologio kaj la skribsistemo

La sonsistemo de la veneda lingvo estas precize la sama kiel tiu de la pola³. Ĝi konsistas el ses bone ekvilibritaj buŝaj vokaloj.

	<i>antaŭaj</i>	<i>centraj</i>	<i>malantaŭaj</i>
<i>fermitaj</i>	i •	ɨ •	• u
<i>mezaj</i>	ɛ •		• ɔ
<i>malfermitaj</i>		A ⁴ •	

Tab. 1. La buŝaj vokaloj de la veneda. (*nerondigitaj* • *rondigitaj*)

Krom tiuj ses ekzistas ankaŭ du fonemoj de nazaj vokaloj, kvankam en la veneda (same kiel en la pola) ilia preciza realigo dependas de la najbaraj sonoj kaj nur en malmultaj kunteksto efektive rezultigas sonon de naza vokalo — kaj eĉ se tio okazas, la nazeco realiĝas asinĥrone.

² En realeco la vorton *Wened* inspiris la malnova greka kaj poste latina popolnomo *Venedi* aŭ *Veneti*, uzata historie por iu gento, kiu ĉirkaŭ 1–4 jc. p.K. loĝis ie oriente de Vistulo kaj la golfo de Gdansk. Plej multaj supozas, ke temis pri slavoj, kaj tiusence la vorto estis poste prunteprenita de aliaj lingvoj — kp. ger. *Wenden* aŭ *Winden* (‘slavoj, precipe de tiuj popoloj, kiuj loĝis proksime al ĝermanoj; soraboj, kaŝuboj’), fin. *Venäjä* (‘Rusujo’).

³ La priskribo de la diversaj sistemsonoj donitaj ĉi tie foje malsamas per detaloj de tiuj donitaj de van Steenberg. Tio spegulas nur malsaman preferon de la aŭtoro klasigi kaj prezenti la fonologion de la pola lingvo, kiu sekve kiel prezenti kaj priskribi la fonologion de la veneda.

⁴ La centran malfermitan vokalon mi preferas marki per la litero /A/, uzatan interalie de iuj ĉinologoj, malgraŭ ke ĝis nun ĝi ne estis aprobita de la Internacia Fonetika Asocio.

	<i>antaŭaj</i>	<i>malantaŭaj</i>
<i>mezaĵ</i>	ĕ ♦	♦ ĥ

Tab. 2. La nazaj vokaloj de la veneda. (*nerondigitaj* ♦ *rondigitaj*)

Kompare kun aliaj lingvoj en la mondo, la konsonantaro de la veneda estas sufiĉe granda. Laŭ la analizo prezentita en la ĉisuba tabelo, ĝi ampleksas 27 sistemsonojn.

	<i>lipaj</i>	<i>dentogingivaj</i>	<i>postgingivaj</i>	<i>palataj</i>	<i>velaj</i>	<i>glotaj</i>
<i>nazaĵ</i>	♦ m	♦ n		♦ ɲ	♦ (ŋ ⁵)	
<i>eksploĉaj</i>	p ♦ b	t ♦ d			k ♦ g	
<i>ekfrotaj</i>		ṭs ♦ ḑz	ṭʂ ♦ ḑʐ	ṭɕ ♦ ḑʑ		
<i>frotaj</i>	f ♦ v	s ♦ z	ʂ ♦ ʐ	ɕ ♦ ʑ	x ♦	♦ (h ⁶)
<i>alproksimaj</i>	♦ (w)	♦ l		♦ j	♦ w	
<i>vibraĵ</i>		♦ r				

Tab. 3. La konsonantoj de la veneda. (*senvoĉaj* ♦ *voĉaj*)

La veneda skribatas per la pola alfabeto, modifita latina alfabeto, kiu konsistas el 32 literoj:

⟨ a ą b c ć d e ę
f g h i j k l ł
m n ń o ó p r s
ś t u w y z ź ż ⟩

Krom ili uzatas ankaŭ 7 digrafoj (duliteraĵoj):

⟨ ch cz dz dź dż⁷ rz sz ⟩

⁵ Kvankam van Steenberg en ne mencias ĉi tiun sonon, ĝi estas grava elemento de la elparolo de la pola, aperanta kiel alofono de /n/ antaŭ /k/ kaj /g/, aŭ kiel naza elemento de la elparolo de ⟨a⟩ kaj ⟨ę⟩ antaŭ la samaj eksplodaj velaj konsonantoj.

⁶ Priskribante la skrib- kaj sonsistemon de la veneda van Steenberg diras: „Estas neniu malsamo de la elparolo inter ⟨ch⟩ kaj ⟨h⟩. La realigo [x] ne estas precize trafa, ĉar malpli da froteco okazas ol en la vera frota konsonanto.” Li diras tamen ankaŭ, ke la veneda estas lingvo „aparte riĉa je dialektoj: preskaŭ ĉiu regiono ŝajnas havi iun lokan formon de la lingvo kaj najbaraj vilaĝoj kun reciproke neinterkompreneblaj dialektoj tute en estas maloftaj”. Tial estas laŭ mi tute sencohave supoziti, ke almenaŭ *dialekcie orzętale* (‘la orientaj dialektoj’) kaj inter ili *galiczany* (‘la galicia’) aŭ multe influita de la slavaj lingvoj kaj uzata en Podlaĥio (ven. *Suślewia*) dialekto *akęci* konservis la distingon inter la elparolo de ⟨ch⟩ kiel /x/, kaj de ⟨h⟩ glote voĉe kiel /h/.

⁷ Van Steenberg en ne listigas ⟨dż⟩ parolante pri la ortografio de la veneda, sed tio ŝajnas esti nur erara preterlaso, ĉar ĝi aperas en la sekcio pri elparolo (klarigita kiel la duliteraĵo markanta /ḑʐ/), kvarfoje ĝi aperas en la vortaro (*dżem* ‘konfitaĵo’, *dżungla* ‘ĝangalo’, *zożdżorar* ‘troigi’, *żdżeszczęń* ‘sugesto’), inkluzivas ĝin la priskribo de mutacio ĉe konjugacio, kaj ties mencio aperas en la „Granda ĉefplano” sen marko de plena forfalo.

Same kiel en la pola, menciinde apartan statuson havas la grafemo ⟨i⟩, kiu palatigas la antaŭan konsonanton. Kaze de pluraj konsonantoj la rezulto estas alofona ŝanĝo de la kvalito (ekz. [m^j], [p^j], [x^j]), sed kaze de la dentogingivaj /n t̪s d̪z s z/ la rezultaj palataj konsonantoj /ɲ t̪ɕ d̪ʑ ɕ ʑ/ estas konsiderataj apartaj sistemsonoj. Aldone, se post la palatiga ⟨i⟩ sekvas alia vokalo, ĝi fariĝas kerno de silabo, dum ⟨i⟩ nur pludonas la kvaliton de palatigo, perdante sian forton de silabigo — ekzemple *piąz* /p^jɕs/ (‘penso’) aŭ *kościół* /ˈkɔɕ.ɕuw/ (‘kastelo’).

Priparolante la sonŝanĝojn de la lasta etapo de evoluo de la veneda, van Steenberg mencias la fenomenojn de malantaŭenira voĉigo (kiu influas la ortografion) kaj malantaŭenira senvoĉigo (kiun la ortografio ne spegulas). Supozeble tamen la simileco al la pola sugestas, ke same en la veneda kaze de ⟨rz⟩ kaj ⟨w⟩ okazas antaŭenira senvoĉigos⁸ — ekzemple *botwala* /bɔ.ˈtʃa.la/ (‘batalo’), *krwięty* [ˈkrʲɛn.tɨ] (‘kruela’) aŭ *jętarprzędza* /jɛn.tar.ˈpɕɛn.d̪ʑa/ (‘entrepreno’) — kaj ke fine de prozodiaj unuoj konsonantoj regule perdas voĉecon⁹ — ekzemple *łag* /wɔŋk/ (‘longe’), *siedź* /ɕɛɕ/ (‘seĝo’) aŭ *krzeszcząd* /ˈkɕɕ.ɕɔnt/ (‘kreskado’).

La konsideroj pri la akcento limiĝas al la rimarko, ke ĝi „preskaŭ ĉiam falas sur la antaŭlastan silabon”, se kompreneble la koncerna vorto havas pli ol unu silabon. Ne estas menciitaj esceptoj al tiu ĉi regulo, sed divenante pri tio de la pola lingvo eblas, ke escepto al tio estas vortoj finiĝantaj per *-ika* aŭ *-yka* (ekz. *matematyka* /ma.te.ˈma.t̪i.ka/ ‘matematiko’). En la pola kroma esceptoklaso estas nombrovortoj finiĝantaj per *-set* (ven. *-czętor*, ‘cent’) aŭ *-kroć* (ven. *-*wiecz*, ‘foje’), do eblas, ke same en la veneda la akcentita silabo povas konserviĝi dum la aldono de *-częta* kaj *-czętor* — ekzemple *trzeczęta* /ˈtɕɛ.ɕɛn.ta/ (‘tricent’) aŭ *ocyczętor* /ˈɔ.ɕi.ɕɛn.tur/ (‘okcent’). Estas ankaŭ tute necerte ĉu alia esceptoklaso en la veneda povas esti certaj formoj de verba konjugacio. En la pola tio estas la kazo de la verboj kun la finaĵoj *-śmy*, *-ście*, *-by* kaj *-bym*, sed tio rilatas al la fakto, ke tiuj finaĵoj estas morfemike moveblaj kaj povas algluiĝi al aliaj partoj de la koncerna frazo; la informo pri tia eblo mankas parolante pri la veneda, do supozeble la rilataj verboformoj ne havas esceptan akcentoskemon.

3.3. La artikolo

Kvankam la vulgara latina lingvo jam havis establitan tendencon uzi montraĵn pronomojn kiel artikolojn, el kiuj poste la difinita artikolo evoluis en ĉiu latinida lingvo, tiu ĉi tendenco devis same subite malfortiĝi en la branĉo, el kiu evoluis la veneda lingvo, ĉar en ĝi gramatika artikolo ne ekzistas.

⁸ Tiun ĉi supozon konfirmas la registraĵo de elparolo pri la numeraloj provizita en la retejo de Johano van Steenberg, kie *trze* (‘tri’) estas elparolata kiel /tɕɛ/. Aŭ fakte eĉ iom kun malantaŭenira postgivingo, do pli kiel [ɕɕɛ].

⁹ Ankaŭ tion konfirmas la menciita registraĵo, kie *nów* (‘naŭ’) estas elparolata kiel /nuf/.

3.4. Deklinacio

Substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj en la veneda deklinacias laŭ nombro, laŭ gramatikaj kazoj, laŭ genro kaj en limigitaj kombinoj ankaŭ laŭ personeco.

		<i>ununombro</i>	<i>multenombro</i>
<i>1^a persono</i>		jo	nu
<i>2^a persono</i>		ty	wu
<i>3^a pers.</i>	<i>malina</i>	ił	li
	<i>neŭtra</i>	ła	le
	<i>ina</i>	łu	

Tab. 4. La personaj pronomoj en la nominativo en la veneda.

La personaj pronomoj uzas kvar gramatikajn kazojn: nominativon (kio?), genitivon (kies? de kio?), dativon (al kio?) kaj akuzativon (kion?).

	<i>la veneda</i>	<i>traduko</i>
<i>nominativo</i>	jo	‘mi’
<i>genitivo</i>	miej	‘de mi’
<i>dativo</i>	mi	‘al mi’
<i>akuzativo</i>	mie	‘min’

Tab. 5. La deklinacio de la pronomo *jo* (‘mi’) kun la ekvivalentoj en esperanto.

Ĉe substantivoj kaj adjektivoj la akuzativo kunfandiĝis kun la nominativo¹⁰, kaj en unuopaj kazoj konserviĝis kroma formo de la vokativo. Ekzistas du gramatikaj nombroj: ununombro kaj multenombro. La veneda posedas tri genrojn: malinan, neŭtran kaj inan.

	<i>ununombro</i>	<i>traduko</i>	<i>multenombro</i>	<i>traduko</i>
<i>nominativo</i>	dom	‘domo(n)’	domie	‘domoj(n)’
<i>genitivo</i>	domu	‘de domo’	domór	‘de domoj’
<i>dativo</i>	domi	‘al domo’	domiew	‘al domoj’

Tab. 6. La deklinacio de la substantivo *dom* (‘domo’) kun la ekvivalentoj en esperanto.

Kaze de adjektivoj kaj posedaj pronomoj gravas ankaŭ personeco de la substantivo, kiun ili priskribas; same kiel en la pola, ne ĉiuj kombinoj de genro kaj personeco — en ununombro distingiĝas la formoj neina kaj ina, dum en multenombro distingiĝas la formoj malinpersona (vira), neinnepersona kaj ina. Kvankam simila, tiu ĉi distingo ne estas precize la sama kiel en la pola, kie adjektivoj kondukas depende de tio ĉu la rilata substantivo estas malinviva, malinneviva, neŭtra aŭ ina en ununombro, kaj malinpersona aŭ nemalinpersona (t.e. malinnepersona, neŭtra aŭ ina) en multenombro.

¹⁰ Tiun ĉi kombinitan kazon van Steenbergem nomas „rekta kazo” (ang. *direct case*).

	ununombro			multenombro				
	malina	neŭtra	ina	malina		neŭtra	ina	
				persona	nepersona			
nominativo	rzyki		rzyka	rzyczy	rzyćce			
genitivo	rzyku		rzyćcej	rzykór			rzykar	
dativo	rzyćcy			rzyćzew				

Tab. 7. La deklinacio de la adjektivo *rzyki* ('riĉa').

Adverboj deriviĝas de adjektivoj laŭ du manieroj: aŭ per la forigo de la finaĵo *-y* aŭ *-i*, aŭ per la aldono de la adverbiga sufikso *-mięć*. En plej multaj kazoj ambaŭ formoj kunekzistas, sed pli longa formo plej ofte havas kromsignifon de maniero de fardo, de plenumado de iu ago. Nur kaze de la participoj adjektivaj, kiuj finiĝas per *-ęci* permesebla estas nur la mallonga formo de adverbo, kiu finiĝas per *-ęć*.

Aldone ĉe adjektivoj kaj adverboj ekzistas tri gradoj de komparado.

<i>radiko</i>	<i>speco</i>	<i>baza grado</i>	<i>pli-grado</i>	<i>plej-grado</i>
kłar-	<i>adjektivo</i>	kłary	kłarzerzy	kłarżeśmy
	<i>adverbo</i>	kłar	kłarzu	kłarżeśmie
wierdź-	<i>adjektivo</i>	wierdzi	wierdzierzy	wierdzieśmy
	<i>adverbo</i>	wierdziemięć	wierdzierzu	wierdzieśmie

Tab. 8. La gradoj de komparado de la adjektivo *kłary* ('klara, hela') kaj la adverbo *kłar* ('klare, hele'), de la adjektivo *wierdzi* ('verda') kaj de la adverbo *wierdziemięć* ('verde').

3.5. Konjugacio

Verboj en la veneda konjugacias laŭ nombro kaj laŭ persono de la subjekto, laŭ tempo (tenso), laŭ modo kaj laŭ aspekto. Modoj ekzistas tri: indikativo, kondicionalo kaj imperativo. Nur la verboj en indikativo konjugacias laŭ gramatikaj tempoj, kiuj estas tri: pasinta, nuna kaj estonta. Verboj en nuna kaj estonta tempoj konjugacias aldone laŭ la aspektoj, kiuj estas du: perfekta kaj neperfekta; en nuntempo la neperfekto markitas per pli longa fleksia finaĵo, dum en estonteco neperfekto estas esprimata per kompleksa formo de la konjugaciita verbo *szer* ('esti') plus infinitivo.

Krom tio ekzistas infinitiva formo de verbo kaj deriveblas de ĝi aktiva participo adjektiva (kp. '-anta') kaj adverbaj (kp. '-ante'), pasiva participo adjektiva (kp. '-ita') kaj substantivigo (t.n. gerundio, kp. '-ado').

		ununombro			multenombro		
		1 ^a pers.	2 ^a pers.	3 ^a pers.	1 ^a pers.	2 ^a pers.	3 ^a pers.
infinitivo		widziar					
pasinteco		widszy	widszyś	widszy	widszimy	widszyście	widszora
nuntempo	perfekta	widze	widziesz	widzie	widziemy	widziecie	widzę
	neperfekta	widziewa	widziewasz	widziewa	widziewamy	widziewacie	widziewa
estonteco	perfekta	widszoru	widszerzysz	widszerzy	widszerzimy	widszerzycie	widszerzę
	neperfekta	joru widziar	jerzysz widziar	jerzy widziar	jerzimy widziar	jerzycie widziar	jerzę widziar
kondicionalo		widziarsi	widziarsisz	widziarsi	widziarsimy	widziarsicie	widziarsię
imperativo		—	widź	—	widziem	widzieć	—
aktiva participo adjektiva		widzięci / widzięcia			widzięcie		
aktiva participo adverba		widzieć					
pasiva participo adjektiva		widźty / widźta / widźci			widźcie		
substantivigo		widział					

Tab. 9. La konjugacio de la verbo *widziar* ('vidi'). La formo de la participoj adjektivaj dependas ne de gramatika persono, sed de genro, laŭ la reguloj pri deklinacio de adjektivoj.

3.6. Formoj neregulaj kaj supletivaj

La priskribo de la veneda lingvo mencias plurajn kazojn de nereguleco aŭ pri formoj supletivaj. Interalie, kelkaj substantivoj konservis preskaŭ formalaperintan formon de la vokativo — ekzemple *Dziew* ('Dio') kaj *Dziewu* ('ho Dio'), *poterz* ('patro') kaj *potrze* ('ho patro'); kelkaj substantivoj havas neregulan deklinacion ekzemple *kap* ('kapo'), *rzej* ('aĵo'); almenaŭ unu derivas la formon multenombran de alia radiko — *womień* ('homo') kaj *ludzie* ('homoj').

		traduko	multenombro	traduko
ununombro	nominativo	kap	rzej	womień
	genitivo	kapcie	rzei	womnie
	dativo	kapci	rzei	womni
multenombro	nominativo	kapta	rzeje	ludzie
	genitivo	kaptór	rzejär	ludzi
	dativo	kapciew	rzejew	ludziw

Tab. 10. La neregula deklinacio de la substantivoj *kap* ('kapo'), *rzej* ('aĵo') kaj *womień* ('homo').

La deklinacio de adjektivoj estas ĉiam regula, krom la derivado de gradoj de komparado, kiu kaze de pluraj adjektivoj sekvas sian propran neregulan skemon, plej ofte suplementitan de kromaj radikoj.

<i>baza grado</i>	<i>pli-grado</i>	<i>plej-grado</i>	<i>traduko</i>
bony	mielerzy	oćmy	‘bona’
mały	piejerzy	pieśmy	‘malbona’
grędzi	mojerzy	mośmy	‘granda’
pieskły	mnierzy	mnieśmy	‘malgranda’
łonięcy	łonierzy	łonieśmy	‘malproksima’
jały	sprzerzy	sprześmy	‘alta’
mółt	pły	płrześmie	‘multa’

Tab. 11. La neregula gradado de la adjektivoj *bony* (‘bona’), *mały* (‘malbona’), *grędzi* (‘granda’), *pieskły* (‘malgranda’), *łonięcy* (‘malproksima’), *jały* (‘alta’) kaj *mółt* (‘multa’).

Rilate al la formado de adverboj el adjektivo, ekzistas nur unu neregulaĵo: *bony* (‘bona’) havas neregule formitan adverbon *bień* (‘bone’).

3.7. La vortprovizo

Pro tio, ke la veneda estas rezulto de la apliko de fonologiaj ŝanĝoj al la latina lingvo, la elirpunkto por la vortaro (almenaŭ plejparte) estas sur la latina vortprovizo. Ĉisube mi listigas kelkajn ekzemplojn de la latinaj etimoj, kune kun ĉiuj peraj etapoj de la evoluo de la lingvo. Laŭ la historia klarigo pri la veneda, la fonologiaj ŝanĝoj okazis laŭ kvar etapoj: de la latina al la frua nordorienta latinida (150–600 p.K.), al la malfrua nordorienta latinida (600–900 p.K.), al la malnova veneda (900–1200 p.K.) kaj al la nuntempa veneda (1200 ĝis nun).

<i>latina</i>	<i>frua n.-or. lat.</i>	<i>malfrua n.-or. lat.</i>	<i>malnova veneda</i>	<i>veneda</i>	<i>traduko</i>
agnum	anjŭ	janjŭ	jań		‘ŝafo’
auscultāre	auskultar	uŝkŭltar	uszekŭtar	uszekieŭtar	‘aŭskulti’
cantāre	kantar	kqtar		kętar	‘kanti’
cælum	ĉjělŭ	ĉjělŭ	częł	czał	‘ĉielo’
circum	ĉirkŭ	ĉřkŭ	czefk	czerek	‘ĉirkaŭ’
discernō	dizĉernu	dŭzĉernu	dezczrzenu	destrzonu	‘mi observas’
ēlēphantem		jŭlēfqŭ		lefęć	‘elefanto’
hōmīne	ŭōmīnī	vŭomnjŭ	womnjŭ	womień	‘homo’
intēr	inter	jętr	jętar		‘inter’
lætum	ljętŭ	ljętŭ	lęty	laty	‘gaja’
quīntum	kŭintŭ	kvętŭ	kwiąty		‘kvina’
quōd	kŭōd	kod		kód	‘tiu’
scīre	ŝĉjir		szczەر		‘scii’
servum	servŭ	srevŭ	srzew	śrew	‘sklavo’
sōlemnem	sŭlemnī	sŭljenjŭ	sleni	śleni	‘solena’
ūnum	unŭ	vynŭ	wyn		‘unu’

Tab. 12. La historiaj etapoj de evoluo de elektitaj vortoj ekde la latina ĝis la veneda. Kunigita ĉelo signifas, ke dum tiu etapo de evoluo la formo ne ŝanĝiĝis.

3.8. La sintakso

En la priskribo de la veneda lingvo tute mankas aparta klarigo pri la sintakso de la lingvo. La aŭtoro lasis nur eksteruniversan (de ekster *Ill Bethisad*) klarigon, ke „pro tio, ke la veneda sian sintakson prunteprenas preskaŭ tute de la pola, vi povas rigardi la polan sintakson, se vi vere interesiĝas”.

4. Specimenoj

La retejo pri la veneda lingvo mencias plurajn specimenojn de tekstoj en la veneda lingvo — kaj tradukitajn, kaj originalajn. Ĉisube mi reskribas kelkajn elektitajn ekzemplojn, kiujn mi provizas aldone per tekstoj en esperanto.

4.1. *Uraceń Donu* (La preĝo de la Sinjoro)

La preĝo „Patro nia” estas historie unu el la plej gravaj kaj oftaj iloj de la kompara lingvistiko. Ties teksto sekvas la formon uzatan liturgie de kristanoj (Mat 6:9–13) kun la aldona doksologio.

*Potrze nostry, kwały jesz en czałór,
sąciewkaty si Twej numię.
Owień Twej rzeń.
Foca si Twa włatać,
komód en czału szyk i sur cierce.*

*Da nów odzej nostry pań kocidzany.
I dziemieć nów nostrze dziewta,
komód i nu dziemiećmy śwór dziewtorzór.
I nie endycz nosz en ciętaceń,
uta liwra nosz dzie mału.*

*Nąk Twie są rzeń i pociestać
i głurza, o siąprz. Amen.*

Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu Via nomo.
Venu Via regno.
Fariĝu Via volo,
kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.

Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ.
Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.

Ĉar Via estas la regno kaj la potenco,
kaj la gloro eterne. Amen.

4.2. *Turz Bable* (La turo de Babel)

La teksto venas el Biblio, la Libro de la genezo, ĉapitro 11, versoj 1–9. La esperanta traduko venas el la Roma meslibro kaj legaĵaro en esperanto, eldonita de UECI.

*I tuty mąd owa wyna lęgwa jak ile sule
porule. Maż posie, kóđ kędy miegrawą za
orzęcie, li jęwieńszorą płan en pazie Szynaru
i jądź jewtaskiera.*

*I li dziczewą wyniałtrzy: „Wnieć, faczem
cegle i bień łaasz kokwiem.” I cegle śrewiewą
lew komód sasa, maż smoła śrewiewa lew ko-
mód cemię. I li dziczewą: „Wnieć, jedziewkam
czytać i turz, kiełmię kwalej jerzy tążer o czał,
i faczem si numię, prokódsimy sie nie desprze-
żer sur tuty mąd.”*

Sur la tuta tero estis unu lingvo
kaj unu parolmaniero. Elmigrante el la
oriento, la homoj trovis taŭgan lokon en la
lando Ŝinar kaj ili tie ekloĝis.

Ili diris unu al alia: „Ek, ni faru brikojn
kaj ni baku ilin per fajro.” Tiel la brikoj servis
al ili kiel ŝtonoj, kaj la bitumo kiel mortero.
Kaj ili diris: „Ni konstruu por ni urbon kaj tu-
ron, kies supro atingu la ĉielon, por ke ni havu
signon kaj ne dispeliĝu sur la tuta tero.”

*Tęk Dziew dzieszcądszy prokód wi-
dziar czytać i turz kwale nacie ludzi je-
dziewkawą. I Dziew dziczewa: „Widzieć! Wyn
popęł i wyna lęgwa pro tutór, maż cześć kóđ li
komięcorą faczer. I stawiecz nił nie jerzy pro
tór nieposibły, kódsię li nie wlar faczer. Wi-
dzieć! Dzieszcządszerzym i miskierzym tór lę-
gwa, prokódsię li nie koprzędzier wyniałtru.”*

*I Dziew despręgszy łosz sur surficz tutu
mędu, maż li parstarą jedziwkar czytać.
Prołu ła opiała sie Babel, prostokód jądź
Dzew miski lęgwa tutu mędu i żwieleć Dziew
despręgszy łosz sur tuty mąđ.*

Sed Dio malsuprenvenis por rigardi la
urbon kaj la turon, kiujn konstruis la homoj,
kaj diris: „Jen ili estas unu popolo, kaj havas
nur unu lingvon. Ĉi tio estas nur la komenco;
nun ili kapablas fari ĉion, kion ili decidis. Ni
malsupreniru do kaj konfuzu iliajn lingvojn
tiel, ke unu ne komprenu la parolon de alia.”

Tiel Dio disigis ilin de tie sur la tutan te-
ron, kaj sekve la homoj ĉesis konstrui la ur-
bon. Tiu loko ricevis la nomon Babelo, ĉar tie
la Sinjoro konfuzis la lingvon de la homoj kaj
de tie Li disigis ilin tra la tero.

4.3. Dziekłaraceń Uniwersała Drzecór Womnie (La Universal Deklaracio de Homaj Rajtoj)

Ĉisube sekvas la unua artikolo de la dokumento de la Uniĝintaj Nacioj. La versio
en esperanto estas la oficiala traduko prenita el la retejo de UN.

*Tuci ludzie noszczę sie liwrzy i jekwali z
rżeśpiece święj dzińtacie i swór drzecór. Li są
dotaci ku rocenie i koszczęce i dziewię ocar
piara wyniałtru en jenie frotrzeńtacie.*

Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj ega-
laj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj
konsciencon, kaj devus konduti unu al alia en
spirito de frateco.

4.4. Więt Miódnocały i Sul (Norda Vento kaj Suno)

Tio ĉi estas unu el la fabloj de Ezopo (gr. Αἴσωπος, ĉ. 620–564 a.K.), antikva greka
poeto, plej bone konata de siaj pluraj mallongaj alegoriaj rakontoj. Unu el ili estas
„Norda Vento kaj Suno”, ofte uzata por kompara lingvistiko. La esperanta traduko de
nekonata aŭtoro venas de la *Aesop Language Bank* (‘Ezopa Lingva Banko’).

*Więt Miódnocały i Sul despytawą dzie
iłu, kwały zmiedz tór je frocierzy, kędy po-
sawa wijatórz enwołyty en kaldu męciołu. Li
oskrodarą sie, kóđ przymu kwali sie rzyszerzy
kuzar prokódsi wijatórz jewieścier swej mę-
ciół, fole koszydrar frocierzy dzie siekądu.*

Norda Vento kaj Suno disputis, kiu estas
la plej forta, kiam voĵaganto preteriris volvita
en varma mantelo. Ili konsentis, ke, kiu unue
sukcesos senigi la voĵaganton de lia mantelo,
tiun oni konsideru pli forta ol la alia.

*Połu Więt Miódnocały zwława froć ko-
mód pociora, uta koju pły ił zwława iłu pocie
wijatórz enwołytywawa sie en swej męciół; i o fi-
nie Więt Miódnocały dziejece swej cięt.*

Do Norda Vento blovis per ĉiuj siaj for-
toj, sed ju pli li blovis, des pli la voĵaganto
envolvis sin en sia mantelo; kaj fine kompat-
inda Norda Vento rezignis.

*Tęk Sul łyczewa kaldamięć, i dzie wiecze
wijatórz jewieszczu swej męciół. I ąąk Więt
Miódnocały jora obilgaty kofieciar, kóđ Sul je
frocierzy zmiedz tór dwór.*

Tiam Suno brilis varme, kaj tuj la voĵa-
ganto deprenis sian mantelon. Tiel Norda
Vento devigis konfesi, ke Suno estas la plej
forta el la duopo.

4.5. Wiersz Jądlu (La poemo de l' Ringo)

Tiu ĉi poemo venas de la romano *The Lord of the Rings* ('La Mastro de l' Ringoj') fare de J. R. R. Tolkien. La esperanta traduko estas fare de Bertilo Wennergren.

*Trze jądle pro rzeżór elfór z kłaru czału,
Sieć pro duczór naninór en kębrar sasiar,
Nów pro ludzi mrotałór judkatór o mroć,
Wyn pro donu cembruзу sur tronu ośkieru,
En pазie Mordoru wądź wąbrze sie kiebtą.*

*Wyn jądeł prokód rzeżer łosz tutór,
Wyn jądeł prokód łosz jęwnier,
Wyn jądeł prokód kolżer łosz tutór,
I o cembartać olegar,
En pазie Mordoru wądź wąbrze sie kiebtą.*

Tri ringoj por la elfoj sub la hela ĉiel',
Sep por la gnomoj en salonoj el ŝton'.
Naŭ por la homoj sub la morto-sigel',
Unu por la Nigra Reĝo sur la nigra tron'
Kie kuŝas Ombroj en Mordora Land'.

Unu Ringo ilin regas,
Unu ilin prenas,
Unu Ringo en mallumon
Ilin gvidas kaj katenas
Kie kuŝas Ombroj en Mordora Land'.

4.6. Bieńdzikaceń (Beno)

Tiu ĉi mallonga poemo estas fare de John Leland (1754–1841), usona baptista animzorganto kaj abolicisto. La traduko estis pretigita de mi mem.

*W Don cie bieńdzika.
W Don ci osocza.
W Don ci da tut kóđ jukędy.
W Don cie przędzie po łąga wita o czał.*

La Sinjoro vin benu.
La Sinjoro vin akompanu.
La Sinjoro donu al vi ĉion plezuran.
La Sinjoro vin prenu post longa vivo al la ĉielo.

4.7. Sacrum

Tiu ĉi peco estas la teksto de rekantaĵo de la kanto titolita *Sacrum* ('sanktaĵejo, sankta spaco') de 2006, kun teksto verkita de Kasia Wilk kaj pola repisto Mezo. La esperantan tradukon mi pretigis mem, surbaze de la pollingva originalo.

*Wołu o sięgły łok sur mędu,
Wądź problemie parstą owiar szyniewkęca.
O embroczacenie, oszczatęcie mie słabtacie,
O le dzieszydru, sięgłamięć o miej omórz.

Je sur mędu wyn miej łok pieskły,
Wądź forzy bociędu krodzie nie kąta sie nił pły.
Fyże jądź ku miu jęgru omorze,
Krzodu en cie, krzodu en swej SACRUM.*

Mi sopiras al la sola loko en la mondo,
Kie problemoj ĉesas havi signifon.
Al brakumoj, kiuj akceptas miajn malfortaĵojn,
Ilin mi deziras, nur mian amon.

En la mondo estas unu mia malgranda loko,
Kie krom korbatado gravas nenio pli.
Mi fuĝas tien kun mia tuta amo.
Mi kredas al vi, mi kredas al mia SACRUM.

4.8. Nie fymar (Ne fumi)

NIE FYMAR



En ĥu jedźwiecze obilga projewceń fymędu.

★

**Wijołacenie kwierzmy dzierzecar o
administraceń z nębru 334-31-23.**

NE FUMI



En tiu ĉi konstruaĵo funkcias
malpermeso pri fumado.

Malobeadon de la peto denunci
al la administrantoj ĉe la numero 334-31-23.

4.9. Randĉa ku milionarze (Amrendevuo kun milionulo)

La ĉisuba teksto estas estas veneda traduko de vera spamaĵo. Ne estas certe ĉu la originalo estis en la angla aŭ en la pola, sed la esperantan version mi pretigis surbaze de ambaŭ.

*Jęwień swa randĉa zmiedz dzeczu milór
liwrór milionarzór jec! Nie dziewiesz szer mi-
lionarz. Rzejstraceń nieptacibĉa.*

Trovu vian amrendevuon el inter dekoj
da miloj de solaj milionuloj ĉi tie! Vi ne devas
esti milionulo. Registriĝo senpaga.

4.10. Pistĉa o Karoĉu (Letero al Karlo)

Ankaŭ la ĉisuba retletero vera spamaĵo tradukita en la venedan. Mi mem pretigis la tradukon en esperanto, surbaze de la provizitaj version en la angla kaj la pola.

Soĉyć, Karolicze!

Saluton, Karlo!

*Szer pocie jora ĉu szyń dziewiny, kóđ
dźwiemy sie okunieszczec jec. Jękóra nie posu
koprzędzier, prokoju nie kunieszczewa cie ję-
trzu, u komóđ pociewa wiwier par le tucie onie
sień cieĉ. Ty jecz moszkieĉ miór soniór i woĉu,
prokóđsi iĉ soń sie rzejalzar en miej wicie. Jo si
en siećmu czaĉu, kędy sizs skrzywier o mie
pistĉa.*

Eble tio estis la signo de Dio, ke ni devas
interkonatiĝi ĉi tie. Mi daŭre ne komprenas
kial mi ne konis vin antaŭe kaj kiel mi povis
travivi tutajn jarojn sen vi. Vi estas la viro de
mia sonĝoj kaj mi volas, ke tiu ĉi sonĝo efek-
tiviĝu en mia vivo. Mi estos en la sepa ĉielo,
se vi skribos al mi leteron.

*Donu ci swej man i swej króđ sur destęce,
par częta i mile milar. Nie posu porĉar en twiej
lęgwie bień, uta desportu ku cieĉ en lęgwie miu
krodzie, miór siętmiećór i miu omorze. Szy ko-
przędziesz ĉa lęgwa, kwiaru mi skrzywier,
maź nie jeczysz dźwiar śpiecar sur mia pistĉa
ĉag.*

Mi ofertas al vi mian manon kaj mian ko-
ron distance, tra centoj kaj miloj da mejloj. Mi
ne scipovas bone vian lingvon, sed mi parolas
kun vi per la lingvo de mia koro, miaj sentoj
kaj mia amo. Se vi komprenas tiun ĉi lingvon,
mi petas, ke vi skribu al mi, kaj vi ne devos
atendi mian leteron longe.

Bosze, Nata V.

Kisojn, Nata V.

4.11. HTTP-jarórz 404½ (HTTP-eraro 404½)

La ĉisuba komuniko estas la vera erar-paĝo, trovebla en la retejo pri la veneda lingvo de van Steenberg. Kompreneble ĝi baziĝas sur la vera komuniko pri la erar-kodo 404 de HTTP (*Hypertext Transfer Protocol*, ‘Hiperteksto-Transiga Protokolo’), kiam la celata dosiero (paĝo) ne estis trovita en la servilo, laŭ la formo, en kiu ĝi aperis antaŭe en la retumilo *Internet Explorer* (‘Esplorilo de interreto’).



Paŝna ĵekóra nie ĵewięta

Paŝna, kwalej szukasz, fi posiblemić dzieprotata u traspusta, je ciępralemić nie o despożyceń, u szer pocie lej numię sie kębli. Probablemić kureszcie ła siępłlcze ĵekóra nie je prąta.

Cięta postry:

- En kazu, kóđ enskrzypszys adres paŝnie drzec en rzegła adresu, wierzewka, szy adres je parletraty korzecemić, i korż, komód fole.
- Opiierz paŝna introdyccenie <http://steen.free.fr> i szuka okoplaceni ojędķciar informaceni dzieszydrata.
- Prokód ociętar jałtra okoplaceni, oklika butoń ↩ [Paŝna Przyjerza](#).
- Prokód szukar informaceni en Internetu, oklika butoń [Szukar](#).
- Kędy łtu tuť nie ożytarzy, parceń pocęca. Cięta ĵekóra wicz po sieciana, po mież u po dzimiedzonu.
- Komód nie koprzędziesz lęgwie wenedczej, łtu fole sie doczar.

HTTP-jarórz 404½ - Paŝna ĵekóra nie ĵewięta
Spłuratórz Internetu

La paĝo ankoraŭ ne trovita

La paĝo, kiun vi serĉas, eble estis forigita aŭ movita, estas neatingebla aŭ verŝajne ties nomo ŝanĝiĝis. Eventuale ĝi simple ankoraŭ ne estas preta.

Provu la sekvajn:

- Kaze, ke vi enskribis la adreson de la paĝo rekte en la [strio] de la adreso, kontrolu ĉu la adreso estas literumita ĝuste kaj korektu ĝin, se necese.
- Malfermu la hejmpaĝon <http://steen.free.fr> kaj sercu la ligilon kondukatan al la celata informo.
- Por provi alian ligilon, alklaku la butonon ↩ [Antaŭa paĝo](#).
- Por serĉi la informon in interreto, alklaku la butonon [Serĉi](#).
- Kiam ĉio ĉi ne helpas, eltenu en pacienco. Provu ankoraŭfoje post semajno, post monato aŭ post duonjaro.
- Kiam vi ne komprenas la lingvon venedan, vi devas ĝin lerni.

HTTP-eraro 404½ – La paĝo ankoraŭ ne trovita
Esplorilo de interreto

5. Komparo

5.1. Komparo kun esperanto

Same kiel la latinida deveno de la veneda lingvo, ankaŭ la plimulto de vortoj en esperanto havas latinidan fonton. Sed pro tio, ke la celo de la internacia lingvo estis ja internacia rekonebleco, la fonetika formo de tiaj vortoj plej ofte serĉas la parton komunan al multaj lingvoj — aŭ sekvante la ortografion, kiu estas pli konservema aspekto de lingvo, aŭ mezumante formojn el kelkaj lingvoj, aŭ ĉerpante rekte el la malnova formo trovebla en la latina. Kaze de la veneda estis tute male, kiam la vortoprovizo — malgraŭ ke prenitaj el la latina — estis submetita al profundaj fonetikaj ŝanĝoj, kiuj rezulte similigis ĝin fonetike al la lingvo pola.

Tio kaŭzas, ke malgraŭ por la plejmulto de vortoj en esperanto kaj la veneda la fono kaj deveno povas esti la sama, la rilato tre ofte ne estas facile rekonebla — ekzemple *dźwiar* kaj ‘devi’, *flurz* kaj ‘floro’, *jotrzan* kaj ‘eterne’, *kętra* kaj ‘kontraŭ’, *kocze pier* kaj ‘kompreni’, *mszatek* kaj ‘mesaĝo’, *numię* kaj ‘nomo’, *orzęc* kaj ‘oriento’, *parfięcy* kaj ‘perfekta’, *rzyki* kaj ‘riĉa’, *siećczętór* kaj ‘sepcent’, *siekrzot* kaj ‘sekreto’, *sięcier* kaj ‘senti’, *żdżeszczę* kaj ‘sugesto’. Ekzistas tamen ankaŭ pluraj vortoj, kiuj estas tuj rekoneblaj aŭ eĉ precize la samaj, kiam la evoluo de la veneda ne aplikis multe da ŝanĝo al unu vorto — ekzemple *analiza* kaj ‘analizo’, *barba* kaj ‘barbo’, *diagonały* kaj ‘diagonala’, *małgra* kaj ‘malgraŭ’, *marmurar* kaj ‘murmuri’, *nie* kaj ‘ne’, *orkiestra* kaj ‘orkestro’, *problem* kaj ‘problemo’, *pronacar* kaj ‘prononci’, *ryskar* kaj ‘riski’, *wirtuały* kaj ‘virtuala’.

5.2. Komparo kun planlingvoj krom esperanto

Malgraŭ ke gravan inspiron por la kreo de la lingvo veneda estis *Brithenig* (*Comroig*, ‘la komra’), kiu estas natureca planlingvo celanta montri eblan latinidan dialekton kun kelta supertavolo, kiu povus evolui en Britujo. La aliro de Johano van Steenberg en estis tamen multe pli sistema, ĉar li kiel la aŭtoro de la planlingvo ne devis fari unuopan decidon pri la preciza formo de la vortoj en la veneda, sed rezulte de profundaj historiaj studoj de la pola lingvo pretigi la „Grandan ĉefplanon”, kiu regas kaj difinas bone la konstruadon de novaj vortoj. Eĉ se la veneda tiurilate ne estis historie la unua tia planlingvo¹¹, eblas diri, ke van Steenberg perfektigis la ĝenron kaj tial la veneda fariĝis grava inspiro por aliaj tiaj kreaĵoj.

Por *Ill Bethisad* mem la veneda estis instigo plukrei tiun ĉi fikcian alternativan version de la mondo kaj plenigi ĝin lingve. Tiu ĉi paralela universo estas nun plenplena de naturecaj planlingvoj, imagitaj kiel evoluo de pralingvoj en nekutimaj lokoj aŭ pluekzisto de formortintaj branĉoj — *Arvorec* (kelta en Bretonujo), *Bâzrâmani* (latinida en Persujo), *Breathanach* (latinida en Irlando), *Brehonecq* (latinida en Bretonujo), *Brithenig* (latinida en Britujo), *Brzhonegh* (latinida en Zelando), *Costanice* (helena inter Argentino kaj Urugvajo), *Dalmatescu* (latinida en Dalmatujo), *Élbica* (latinida en Elbo), *Emisc* (anglofrisa ĉirkaŭ Hanovero), *Føtisk* (ĝermana en Ŝlesvigo-Holstinio), *Jelbäzech* (latinida en Svislando), *Jovian* (latinida en Alzaco-Loreno), *Judajca* (latinida de judoj), *Kerno* (latinida en Kornvalo), *Lessinu* (latinida en Turingujo), *Madzi* (ugra en Oregono), *Manoeg* (kelta en Manksinsulo), *Narbonôsc* (*langue d’oc* en Narbonio), *Našica* (nordslava en Skandinavio), *Parra* (latinida en Krimeo), *Pémišna* (ĝermana en Ĉeĥujo), *Rhenish* (ĝermana en Rejnlando-Palatinato), *Riksmål* (komuna nordĝermana en Skandinavio), *Seimi* (suoma en Ŝetlando), *Skuodian* (nordslava en Livonujo), *Slvanjek* (latinida en Slovakujo), *Šležan* (latinida en Silezujo), *Tuhärinje* (hindeŭropa en Ŝinĝango), *Vissi* (ĝermana en Azoroj), *Vüozgašchai* (nordslava ĉirkaŭ Vologdo), *Wessisc* (anglofrisa en Vajtinsulo) kaj *Xliponian* (latinida en orienta Balkanio).

¹¹ Ĉi tie menciindas interalie *Sievrøsku* (1992) de James Campbell, *Thosk* (1992) de Dean Easton, *Proto-Liotan* (1993) de Geoff Eddy, *Somerish* (1995) de Bo Bernvill, *Hattic* (1996) ankaŭ de Jan van Steenberg, *Breathanach* (1998) de Geoff Eddy, *Gutisk* (2000) de Damien Erwan Perrotin, *Kirumb* (2000) de Muke Tever, *Wessisc* (2000) de Damon M. Lord, *Xliponian* (2000) de Ronald Kyrmse, *jåzaht Severøen* (2001) de Libor Sztemon kaj *Našica* (2001) de Jan Havliš.

5.3. Komparo kun naturaj lingvoj krom la pola

El inter la vivantaj naturaj lingvoj, la fikcia kazo de la evoluo de la veneda lingvo estas iugrade simila al la kazo de la lingvo rumana (rum. *limba română* /'lim.ba ro.'mɨ.nə/). Nuntempe parolata en Rumanujo kaj Moldavujo, kune kun tri proksime parencaj endanĝerigitaj lingvoj arumana, istrorumana, meglenoromana ili estas la solaj restantaj lingvoj de la orientlatinida subbranĉo de la posteuloj de la lingvo latina. Kvankam historie la latinida lingvofamilio etendiĝis en Eŭropo la tutan spacon de la okcidenta bordo de la Ibera duoninsulo ĝis Dobroĝo kaj la Nigra maro, post la formorto de la lingvo dalmata kaj preskaŭ formorto de la istria rompita estis la geografia kontinueco de la dialekta spektro liganta la rumanan al la friula, la venecia kaj la itala.

La forpuŝo de la lingvoj latinidaj en Balkanio estis ligita kun la enmigrado de slavaj popoloj, el kiuj nun konsistas la suda subbranĉo de la slava lingvofamilioj. Tiuj ĉi lingvoj havis grandan kaj gravan influon al la lingvo rumana, kiu evoluante en la medio de slava supertavolo nun estas videble aparta de la resto de la latinida lingvofamilio — enhavas plurajn prunteprenaĵojn (ekz. *nevastă* ‘edzino’, *sfânt* ‘sankta’ kaj *iubi* ‘ami’), havas apartan sonsistemon (kompare pli grandan, ne evitas kombinojn de konsonantoj, reaperigis por si /h/) kaj videble malsamas morfologie (konservis deklinacion laŭ gramatikaj kazoj, konservis tripartan sistemon de gramatikaj genroj, igis kelkajn verbojn reflektivaj, kiel ekz. *a se teme* ‘timi’ kaj *a se naște* ‘naskiĝi’).

5.4. Komparo kun la pola

Kiel estis priskribite, la celo de la kreo de la lingvo veneda estis plenumi la samajn evoluajn ŝanĝojn, kiuj okazis de la praslava ĝis la nuntempa pola, surmetante ilin sur la pralingvo latina. Por taksi la sukceson de tiu ĉi ridiga aliro al la realigo de tiu ĉi celo, eblas kompari diversajn vortojn en la pola, kiuj historie estis pruntitaj de la latina, al la ekvivalentoj en la veneda. Ĉisuba listo de vortoj povas servi kiel pruvo de tio, ke la analizo de la fonologia historio de la polaj pruntaĵoj el la latina kaj divenita de ĝi listo de fonetikaj ŝanĝoj estis sufiĉa por bone kapti la evoluon de la lingvo.

<i>traduko</i>	<i>latina</i>	<i>veneda</i>	<i>pola</i>
‘absoluta’	absolūtus	absoluty	absolutny
‘afrikano’	āfricānus	afrykany	Afrykanin
‘ĥoro’	chorus	kór	chór
‘ŝlosilo’	clāvis	klucz	klucz
‘kolombo’	columbus	kołab	gołab
‘eksperimento’	experīmentum	ekspery mię	eksperyment
‘figo’	fīca	fik	figa
‘iniciato’	initiativus	inicjaciwa	inicjatywa
‘Jesuo’	Iēsūs	Jezus	Jezus
‘maldekstra’	lævus	lewy	lewy
‘maro’	mare	marz	morze
‘meblo’	mōbilis	mobiel	mebel
‘orkestro’	orchēstra	orkiestra	orkiestra

‘palaco’	palatium	połac	pałac
‘pipro’	piper	piepr	pieprz
‘plago’	plaga	płaga	plaga
‘poŝto’	posita	poszta	poczta
‘kvartalo, kvaronjaro’	quārtāle	kwartał	kwartał
‘regulo’	rēgula	regula	reguła
‘sabato’	sabbatum	sobota	sobota
‘sukero’	saccharum	cukier	cukier
‘Satano’	Satanās	Szatan	Szatan
‘lernejo, skolo’	schola	szkoła	szkoła
‘sireno’	sīrēna	szyrena	syrena
‘resto’	restō	reszta	reszta
‘temperaturo’	temperātūra	temperatera	temperatura
‘titolo’	titulus	tytuł	tytuł
‘vino’	vīnum	win	wino

Tab. 13. Ekzemplaj paroj de tre similaj vortoj en la veneda kaj la pola kun la origino en la latina kaj la signifo en esperanto.

En la vortprovizo de la veneda lingvo troviĝas tamen ankaŭ pluraj ekzemploj de vortoj, kies formo veneda sufiĉe malsimilas de tiu en la pola, malgraŭ ke en la pola lingvo la koncerna vorto estas pruntaĵo de la latina. Tiaj vortoj ne nepre tamen estas pruvo de nesufiĉo de la elektitaj sonŝanĝaj reguloj pri la evoluo de la veneda, ĉar ilia pruntado en la polan povis okazis en diversaj historiaj etapoj — se iu latina vorto estis enkondukita en la polan malfrue, antaŭ nelonge, ties fonetika historio de poligo ne trairis la tutan vojon, kiu etendiĝas ĝis la praslava lingvo, kaj tial la malsameco inter la formo veneda, kiu ja simulas la tutan tian vojon, devas ne mirigi.

<i>traduko</i>	<i>latina</i>	<i>veneda</i>	<i>pola</i>
‘aktoro’	āctor	aktórz	aktor
‘inko’	ātrāmentum	jatramię	atrament
‘cepo’	cēpulla	czepła	cebula
‘civilizacio’	cīvīlisātiōnem	czywilzaceń	cywilizacja
‘dentisto’	dēntista	dzięcista	dentysta
‘formo’	fōrma	froma	forma, kształt
‘greka’	Græcus	grzeczy	grecki
‘senpovo, impotenteco’	impotentia	impotęca	impotencja
‘inteligenteco’	intelligentia	inteliżęca	inteligencja
‘lanco’	lancea	łóncza	lanca
‘lavendo’	lavendula	ławięda	lawenda
‘lingvisto’	linguista	łęgwista	lingwista
‘museo’	mūsēum	mużej	muzeum
‘nervo’	nervus	nierzv	nerw
‘opinio’	opīniō	opinień	opinia

‘opcio’	optiō	opceń	opcja
‘registri’	regerere	rzejestrar	rejestrować
‘religio’	religio	reliżeń	religia
‘socialisto’	sociālista	socjalista	socjalista
‘stabila’	stabilis	stabły	stabilny
‘subtila’	subtīlis	subtyły	subtelny
‘televidilo’	televīsor	telewizōrz	telewizor
‘universitato’	ūniversitās	uniwersytać	uniwersytet

Tab. 14. Ekzemplaj paroj de sufiĉe malsimilaj vortoj en la veneda kaj la pola kun la origino en la latina kaj la signifo en esperanto.

La flanka konsekvenco de la plenumo de la veraj fonologiaj ŝanĝoj el la historio de la pola estis, ke la rezulta lingvo sonsisteme tre similas al la pola — ne nur la uzataj vokaloj kaj konsonantoj estas precize la samaj, sed ankaŭ la rezulta fonotaktiko de la lingvo estas sufiĉe simila al la pola. Tio kaŭzis, ke aplikinte la samajn fonetikajn ŝanĝregulojn al fonta radiko latina, la rezulta vorto tre ofte estis precize la sama, kiel vere ekzistanta vorto en la pola, kiu rezultis el la apliko de la ŝanĝreguloj al fonta radiko praslava.

<i>traduko de la veneda</i>	<i>latina</i>	<i>veneda</i>	<i>pola</i>	<i>traduko de la pola</i>
‘ŝafoj’	agnī	janie	Janie	‘Johano.VOC’
‘amu’	amā	jem	jem	‘manĝas.1SG’
‘jaro’	annus	on	on	‘li’
‘bela’	bellus	biały	biały	‘blanka’
‘fromaĝo’	cāseus	każ	każ	‘ordonu’
‘hundido’	catulus	kociół	kociół	‘kaldrono’
‘urbo’	cīvitās	czytać	czytać	‘legi’
‘kiu.GEN’	cuius	kiju	kiju	‘bastono.VOC’
‘tagoj’	diēs	dzieje	dzieje	‘historio, okazaĵoj’
‘detruas.3PL’	dēstruunt	dzielę	dzielę	‘dividas.1SG’
‘doloradas.2SG’	dolēbās	dolewasz	dolewasz	‘alverŝas.2SG’
‘estas.2SG’	es	jesz	jesz	‘manĝas.2SG’
‘estas.3SG’	est	je	je	‘manĝas.3SG’
‘filinoj.GEN’	filiārum	filar	filar	‘piliero’
‘fajro’	focus	fok	fok	‘de.fokoj’
‘havas.1SG’	habeō	ja	ja	‘mi’
‘ŝin’	illī	lej	lej	‘verŝu’
‘tiom.kiom’	quisque	kiszka	kiszka	‘intesto’
‘logika’	logicus	logicy	logicy	‘logikistoj’
‘malbona’	malus	mały	mały	‘malgranda’
‘malplej.granda’	minimus	mnieśmy	mnieśmy	‘min.PST.1PL’
‘sendu’	mitte	mieć	mieć	‘havi’
‘movo’	movimentum	mumię	mumię	‘mumion’

‘ni.DAT’	nostrō	nów	nów	‘novluno’
‘naŭ	novem	nów	nów	‘novluno’
‘oleo’	oleum	ola	Ola	‘Aleksanjo’
‘poto’	olla	ulica	ulica	‘strato’
‘malfermas.1SG’	aperiō	oprze	oprze	‘rezistos.3SG, bazos.3SG’
‘patro.VOC’	patre	potrze	potrze	‘frapos.3SG’
‘brusto’	pectus	piecu	piecu	‘forno.VOC’
‘pia’	pia	pij	pij	‘trinku’
‘pizo’	pisum	pies	pies	‘hundo’
‘poluso’	polus	pół	pół	‘duono’
‘lokita’	positus	pusty	pusty	‘malplena’
‘kiel’	quōmodo	komód	komód	‘komodo.GEN’
‘sola, singulara’	singulus	sięgły	sięgły	‘atingis.3PL.F’
‘fratino.GEN’	sorōrem	sorze	SORze	‘urĝejo.LOC’
‘suferu’	suffer	zwierz	zwierz	‘sovaĝa.besto’
‘sin.GEN’	suī	siej	siej	‘semu’
‘estas.1PL’	sumus	sumy	sumy	‘sumoj’
‘tiradas.1SG’	tirava	trawa	trawa	‘herbo’
‘vojo.DAT’	vād-	wadzi	wadzi	‘ĝenas.3SG’
‘vagino’	vāgīna	wojna	wojna	‘batalo’
‘vitra’	vitreus	wietrzy	wietrzy	‘ventumas.3SG’
‘flugo’	volō	wół	wół	‘bovo’
‘voladas.1SG’	volēbam	wlewa	wlewa	‘enverŝas.3SG’

Tab. 15. Ekzemploj de vortoj en la veneda (kun origino kaj signifo)
hazarde similaj al vortoj en la pola (kun ilia signifo en esperanto.)

6. Konkludo

La veneda lingvo (ven. *wenedyk*) estas fascina arta natureca planlingvo, kiu ĉerpis ideojn de la antaŭe kreitaj planlingvoj kaj fariĝis grava inspiro por la tuta ĝenro de fikciaj diaĥronaj lingvoj.

Johano van Steenberg, la aŭtoro de la veneda lingvo, starigis por ĝi tre konkretan celon, kiu estis plenumi la historian evoluon de la pola lingvo, sed de la alia elirpunkto — la lingvo latina. Sukcesan atingon de tiu ĉi celo eblas taksi rigardante la nombron de vortoj, kiujn la pola prunteprenis sufiĉe frue kaj rekte de la latina, kaj kiuj en la veneda aspektas precize aŭ preskaŭ same.

Aparte rimarkinda estas la impreso, kiun donas la lingvo, al homoj, kiuj ĝin ne scipovas. Pro la sekvado de la samaj ortografiaj konvencioj, uzado de la sama fonemaro kaj tre similaj fonotaktikajn regulojn, la veneda povas facile konfuziĝi kun la pola kaj skribe, kaj aŭde. Tiun ĉi kaptilon povus eviti scipovantoj de slavaj lingvoj, se ili rimarkus kiom da vortradikoj ne estas slavaj, sed verŝajne ne parolantoj de latinidaj lingvoj, ĉar la grandaj ŝanĝoj okazintaj en la veneda malfaciligas rekonadon de ties kaŝita latineco.

Fontoj

- Diversaj aŭtoroj, *Conlanger: Polskie Forum Językotwórców, Osobliwości, osobistości i dziwactwa tego forum* ('Planlingvisto: Pola forumo de lingvokreantoj, Kuriozaĵoj, gravuloj kaj strangaĵoj de tiu ĉi forumo', <http://www.conlanger.fora.pl/inne,6/osobliwosci-osobistosci-i-dziwactwa-tego-forum,776-105.html>), 11.03.2011.
- Dorota Gut, *Now@mow@* ('Nov@ p@rolo', <http://szkolazklasa.gazeta.pl/szkolazklasa/1,58420,1905232.html>), 9.02.2004.
- Diversaj aŭtoroj, *Ill Bethisad Wiki* ('Vikipedio de *Ill Bethisad*', https://ib.fraht.net/w/Main_Page), 5.07.2023.
- Diversaj aŭtoroj, *Ill Bethisad Wiki, Wenedyk* ('Vikipedio de *Ill Bethisad*, La veneda', <https://ib.fraht.net/w/Wenedyk>), 7.08.2007.
- Diversaj aŭtoroj, *Langmaker* ('Lingvokreanto', langmaker.com, arĥivita ĉe <https://ar-kaia.gitlab.io/www.langmaker.com/>), 30.08.2005.
- Andrew Smith, *The Irrefutable Proof about Hobbits* ('La nerifutebla pruvo pri hobitoj', <https://intheologus.wordpress.com/>), 28.06.2022.
- Andrew Smith, *The page of Brithenig* ('La paĝo de la komra', <http://hobbit.griffler.co.nz/homepage.html>, konservita ĉe <http://steen.free.fr/brithenig/introduction.html>), 18.08.2009.
- Jan van Steenbergen, *Г҃ѣѣ B҃ѣѣauxѣ: A short grammar of the Vozgian language* ('Mal-longa gramatiko de la lingvo vozgia', <http://steen.free.fr/vozgian/index.html>), 31.03.2010.
- Jan van Steenbergen, *Interslavic language* ('La interslava lingvo', <http://steen.free.fr/interslavic/index.html>), 31.05.2022.
- Jan van Steenbergen, *Multilingual Mutterings: The pages of Jan van Steenbergen* ('Plur-lingva balbutado: La retejo de Jan van Steenbergen', <http://steen.free.fr/>), 24.08.2013.
- Jan van Steenbergen, *Rzejpybiełka Dwar Korunar* ('Respubliko de Respubliko de la Du Kronoj', <http://steen.free.fr/rtc/index.html>), 6.03.2010.
- Jan van Steenbergen, *Wenedyk: Gramatyka lęgie wenedczej* ('Gramatiko de la lingvo veneda', <http://steen.free.fr/wenedyk/index.html>), 24.03.2010.
- Diversaj aŭtoroj, *Wikipedia, Język międzysłowiański* ('Vikipedio, La interslava lingvo', https://pl.wikipedia.org/wiki/J%C4%99zyk_mi%C4%99dzys%C5%82owia%C5%84ski), 28.08.2023.
- Diversaj aŭtoroj, *Wikipedia, Venedic language* ('Vikipedio, La veneda lingvo', https://en.wikipedia.org/wiki/Venedic_language), 17.03.2023.

Mi volas esprimi grandegan dankon
al la servo *WaybackMachine* ('AntaŭlongaMaŝino')
fare de *Internet Archive* ('la Interreta Arĥivo')
pro ilia laboro konservi la historion de la reto
de malapero kaj forgeso.

Pluraj el la ĉisupraj fontoj estas retpaĝoj,
kiuj jam de jaroj ne funkcias.
La esploro por tiu ĉi laboraĵo
ne estus ebla sen ilia diligenta arĥivado.